STARTO

N-ro 2/2024 (291)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

Esperantistoj kuris por “Paraple” - helpi al handikapuloj

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto**: cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 1160 Kč, 700 Kč (rete), 400 Kč (rete por ĈEA-anoj); Marček: 1360 Kč, 900 Kč (rete), 600 Kč (rete por ĈEA-anoj), Cink por progresintoj 1920 Kč, 1000 Kč (rete), 700 Kč rete por ĈEA-anoj). Aliĝoj: kurzy@esperanto.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (mem-stariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligon al la gazeta retejo, skribu al: muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:
2800 186 228/2010
Fio banka Svitavy

Výbor ČES:

Předseda: Mgr. Ing. Jiří Tomeček, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz**:** (koordinace a reprezentace ČES, muzeum Svitavy)

Místopředseda: Mgr. Libuše Hýblová, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (vnější vztahy, UEA, EEU)

Pokladník: Mgr. Andrea Švubová, DiS, svubova@esperanto.cz (evidence a aktualizace členské základny, účetnictví svazu a správa majetku ČES)

Člen výboru: Leonarda Chaloupková, leonarda.chaloupkova@esperanto.cz (kluby a sekce, konference, granty)

Člen výboru: Mgr. Josef Kalčík, kalcik@esperanto.cz (spolupráce s mládeží, web)

Redaktor Starta: Miroslav Malovec, miroslav.malovec@esperanto.cz (jazyk a historie hnutí, kultura, odborné aplikace, pedagogika) fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:
Petr Chrdle, Anglická 878,
252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201,
chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity
www.facebook.com/Esperanto.cz/
www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy
www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/
www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

Vážení členové Svazu a čtenáři STARTA,
čtete další číslo našeho bulletinu a možná si ani neuvědomujete množství práce, které věnuje přípravě těch dvaatřiceti stránek každý čtvrtrok náš zasloužilý redaktor Mirek Malovec. Pamětníci ví, a internetoví hledači mohou dohledat na webu, jak vypadalo STARTO před dvaceti, třiceti lety. Posun je znát.

Je to Mirkova práce, za kterou mu nebudeme nikdy dost vděční, zajistit a redigovat dostatečný počet relevantních příspěvků. A musíme být vděční i autorům, kteří pravidelně přispívají. Ale když si přečtete několik START zpátky, zjistíte, že se jména přispěvatelů neustále opakují. Spočítáte je na prstech jedné ruky. STARTO je náš věstník, který má mimo jiné informovat o dění v esperantském hnutí u nás. Copak se u vás nic neděje? A pokud neděje, proč něco neuděláte?

Neobstojí výmluva, že nejste psavci, že neumíte napsat hezký článek. Stačí základní informace, případně pár fotek. Příprava STARTA trvá více než měsíc. V podstatě hned po vydání jednoho čísla začíná Mirek pracovat na dalším čísle. V průběhu přípravy vzniká postupně několik verzí, které kontroluje a připomínkuje dalších deset lidí. Obavy, že zveřejníme něco s chybami či špatně formulované, nejsou na místě.
Svaz a STARTO je tady pro vás, nikoliv naopak. Pojďme přispět k jeho činnosti.

Na loňské konferenci v Prudké jsme se rozhodli nabídnout pořadatelství Universala Kongreso v roce 2025 v naší zemi. UEA naši nabídku přijalo a před námi stojí úkol, výzva, podílet se na nejvýznamnější akci esperantistů ve světě a po dvou úspěšných kongresech v Praze v letech 1921 a 1996 připravit minimálně stejně úspěšný kongres příští rok v Brně. To ale nemůže připravovat šest členů výboru!

Letošní Universala Kongreso se uskuteční za měsíc v Arushi v Tanzánii. Je to první kongres v celé sto dvacetileté historii pořádání kongresů, který se uskuteční v Africe. Je to poslední kontinent, s výjimkou Antarktidy, kde se kongres dosud nekonal. Pro nás je o to významnější, že předchází kongresu u nás a musíme účastníkům prezentovat, že jsme připraveni.

Využíváme možnosti nových technologií a v květnu se výbor Českého esperantského svazu sešel online s vedoucími místních klubů a sekcí, abychom informovali o stavu příprav i diskutovali o tom, co je třeba dále udělat. Zvláště plodná byla diskuse o hlavním tématu kongresu v Brně. Nabízí se hned několik aktuálních témat. Jejich návrhy zašleme UEA, které má konečné slovo při jeho volbě, stejně jako musí potvrdit naše kandidáty do Loka Kongresa Komitato. Jsem rád, že do tohoto orgánu se kromě členů výboru zapojilo dalších dvanáct esperantistů od nás i ze zahraničí. Po jejich schválení ze strany UEA je budeme prezentovat v příštím čísle STARTA.

Téma UKo je pravidelným obsahem každoměsíčních online schůzí výboru. Tato setkání jsou operativní a šetří čas i peníze, ale přesto je dobré se jednou za čas potkat tváří tvář. Výbor se proto sešel v červnu v Chocni v místnostech, které nám ochotně zapůjčil Český železničářský esperantský svaz, a kromě UEA diskutoval hlavně přípravu naší konference v září v České Třebové. Využili jsme účasti Ladislava Kováře a dotáhli program této akce. Mimo jiné budeme mít možnost shlédnout vybrané esperantské předměty z depozita uloženého v tamějším muzeu, které není běžně dostupné. A samozřejmě budeme diskutovat o Universala Kongreso 2025 v Brně.

Jste všichni srdečně zváni!!

Mgr. Ing. Jiří Tomeček, předseda

Teamo Esperanto denove subtenis handikapulojn

Inter la 1-a kaj la 20-a de majo 2024 realiĝis jam la kvara karitata konkursa evento Virtuala kuro por "Paraple". La konkurson partoprenis **1254 homoj kaj 65 teamoj**. Jam tradicie (regule ekde 2017) aliĝis al la konkurso teamo ESPERANTO, kiu ĉi-jare havis **54 membrojn el 10 landoj**. Dum dudek tagoj partoprenintoj diligente kuris, biciklis, marŝis kaj sukcesis kolekti pere de poŝtelefonaj aplikaĵoj **6244 kilometrojn**! Dank' al tio la teamo fariĝis **la 5-a plej bona**!

Per startkotizoj 300,- CZ esperantistoj kolektis **minimume 16.200,- CZK** (plus kromajn donacojn) por realigo de terapiaj restadoj por paraplegiuloj (rulseĝuloj) en la praga Centro Paraple, funkcianta jam 30 jarojn. Jen inspira ekzemplo, kiel kunligi firmigon de propra sano, helpon al bezonantoj kaj diskonigon de Esperanto inter la publiko.

La teamo ESPERANTO fieras pro la plej bona piedmarŝanto de la tuta konkurso. Li estas **Martin Vávra** el Prago, kiu sukcesis marŝi dum la konkurso **627 km**. Li estis publike premiita dum la evento Kuro por "Paraple", kiu jam la dudek kvaran fojon okazis sabate la 25-an de majo 2024 en la parko Malešice en Prago.

Grandan sukceson havis ankaŭ ĈEA-komitatano **Josef Kalčík**, kiu rulsketante kolektis **512 km**. Tiel li fariĝis la tria plej sukcesa en la kategorio.

En la teamo estis ankaŭ pliaj bravuloj gratulindaj (Jiří Mišurec – la 7-a loko – piedirado/viroj, Magdalena Golden – la 8-a loko – marŝado kun hundo/virinoj, Ivo Miesen – la 8-a loko – biciklado/viroj, Miroslava Šavelová- la 10-a loko – piedirado/virinoj, Hanna – la 10 loko – biciklado/virinoj).

En Malešice esperantistoj interalie renkontiĝis kun la fama artisto Zdeněk Svěrák, kunfondinto de la Centro Paraple kaj honora membro de E-mental'. Jam por du liaj konataj filmigitaj teatraĵoj ("Murdo en salona kupeo" kaj „Konkero de la Norda poluso") tri klubanoj kreis Esperantajn subtekstojn. DVD-oj sen-page prunteblas por prezento dum Esperanto-renkontiĝoj. Interesitoj skribu al e-mentalprago@seznam.cz

Gratulon al ĉiuj membroj, kiuj per diligenta sportumado helpis al la sukceso de la tuta teamo. Dankon al ĉiuj subtenantoj! Kaj ankaŭ al la klubo E-mental' kaj precipe al Vlasta Pištíková por la iniciato kaj diskonigo inter esperantistoj. Ni esperas, ke venontjare la teamo estos pli granda kaj ni havos pli grandan ŝancon atingi la unuan lokon! Sekvu en aprilo 2025 la Kalendaron de Esperanto.cz kaj aliĝu ankaŭ vi!

Vlasta Pištíková, Pavla Dvořáková

E-mental en Ostrava

13.4.2024

Muzea Nokto

Vendrede la 24-an de majo 2024 ankaŭ Esperantomuzeo prenis partoprenon en programo de Muzea Nokto en Svitavy. Jam en la posttagmezaj horoj ĉiĉeronis Jan Richtr en la turo de la preĝejo Vizito ĉe Virgulino Maria. En la vesperaj horoj okazis trarigardoj de Ottendorfer-biblioteko inkluzive de Esperantomuzeo, kie ni konatigis al vizitantoj Esperanton, gastojn de la muzeo aŭ Esperanto-movadon.

Nian muzeon vizitis pli ol 100 personoj. Estis tre granda intereso aŭdi, kiel Esperanto sonas.

Li Huang, nia klubanino, estis petita de la direktoro de Urba Muzeo kaj Galerio pri prezentado de Te-ceremonio. Ankaŭ ĉi tie disvolviĝis granda diskuto. La programo finiĝis preskaŭ noktomeze.

Libuše Dvořáková

Svitavanoj aktivas

Marcipana Pasko

Sabate la 23-an de marto 2024 la Esperanto-klubo Svitavy aranĝis en Esperantomuzeo tradician Marcipanan Paskon. La ŝatata aranĝo estis ligita kun aliaj aktivadoj de Urba Muzeo kaj Galerio (UMG).

Por pli multe propagandi la vendado de marcipano estis preparita ankaŭ en la spacoj de UMG. Modladon el marcipano gvidis kiel ĉiam Anička Vyšinková el Vracov. Pli ol 80 infanoj akompanataj de la gepatroj modlis leporojn, kokidojn, lumbrikojn aŭ kokcinelojn.

Ĉiu juna artisto por sia besteto gajnis Memordiplomon kaj forportis sian produkton singarde hejmen.

L. Dvořáková

Vojaĝo kun ekkona celo

Longtempa intereso de la klubanoj de Esperanto-amikoj en Svitavy pri la historio kaj naturo de nia patrujo venigis nin al pli amikaj kontaktoj kun pedagogoj kaj aliaj dungitoj de Elementa Lernejo Svitavy, strato Riegrova. Tial ni uzis okazon engaĝi nin en preparo kaj realigo de ekkona semajnfina ekskurso kaj avanci al pli alta nivelo de reciproka kunlaboro. Jam pli frue ni partoprenis en aranĝoj de la lernejo kaj inverse kaj nun ni povis influi la temon kaj lokon de restado. Ni elektis Potštejn kaj ĝian ĉirkaŭaĵon kaj kiel bazon belan pensionon Sub Belvidejo en proksima Vrbice.

Ni forveturis jam vendrede 26.4.2024 kaj ĉe nelonga halto survoje ni testis eminentan sukeraĵejon de Mareček en Potštejn kaj agorditaj agrable ni poste enloĝigis nin en la pensiono. Post vojaĝo el Svitavy ni devis iomete ripozi, tial la vespero estis orientita al reciproka interkonatiĝo, reciproka interŝanĝado de viv-

spertoj kaj gustumado de lokaj specialaĵoj. Jam vespere ni ĝoje atendis la sabaton kaj piedekskurson al la burgo Potštejn.

Kaj venis la sabato. Post prenita matenmanĝo ni vestis turistajn vestaĵojn, pakis lunĉon kaj sufiĉajn provizojn, por plenumi trinkan reĝimon, kaj ekmarŝis al Potštejn. Tra vojo glata neglata – kaj konsiderinde malfacila. Ni iris laŭ ruĝaj turismaj markoj – laŭ vojo de D-ro J.S.Guth–Jarkovský – kaj lastan parton el Potštejn al la burgo laŭ bluaj markoj, preter unuopaj stacioj de kalvaria vojo. Ni sukcesis veni precize al rezervita tempo de trarigardo – kaj tiu estis perfekta! La ĉiĉeronino estis tre agrabla kaj ni eksciis multon novan, interesan kaj rekte surprizan pri la burgo Potštejn mem, pri ĝiaj historio kaj posedantoj, ni vidis ankaŭ drakan ovon antaŭ elkoviĝo, monerfarejon, riparitan kapelon ...

Post vizito de la burgo ni kompreneble ne povis eviti viziton de bierfarejo Clock kaj konfirmi, ke iliaj produktoj ĉiam tenas la pintan lokon aprezatan de ekspertoj ne nur en fako gastronomio. Sed ne nur bierfarejon, ni tramarŝis antikvan parton de Potštejn, Bělisko, ĉirkaŭaĵon de la kastelo kaj denove haltis en brila, iomete retrotempa sukeraĵejo, kiu faris dolĉan punkton post Potštejn.

Kaj poste vojo reen. Eĉ pli ŝvitiga ol tien. Montetoj ŝajnis pli krutaj kaj vojo pli longa… Sed ni venkis! Post mallonga rilaksado en la pensiono ni ekpaŝis al la belvidejo Vrbice kaj ĝi valoris la penon! Belega panoramo en ĉiuj flankoj, trans la monto *Kunětická hora* ni vidis blankajn suprojn de Karkonoŝo kaj de Neĝmonto (Sněžka). Ĉe la belvidejo estas malgranda stando kun turismaj vizitkartoj kaj refreŝigaĵoj, kiuj estis tre bonvenaj. Belege! Kaj poste vespermanĝo kaj babilado. Ni povis iomete levi kurtenon sur problemaro de la lerneja sistemo kaj niaj kolegoj scias pli multe pri Esperanto, pri ĝia estiĝo kaj nuna stato, pri agado de nia klubo.

Post laciga tago venis dolĉa dormo, sed matene la laciĝo pro turismo forfalis kaj nova suna tago staris antaŭ ni. Kiam ni adiaŭis la pensionon, ni ekvojis al nova

kleriĝo, ĉifoje al Muzeo de Metioj en Letohrad. Ni vizitis du ekspoziciojn – Malnovajn Metiojn kaj Mekanikajn Maŝinojn, ambaŭ estis tre interesaj. Agrabla ĉiĉerono, ankoraŭ junuleto, sciis bele rakonti kaj havis bonajn sciojn pri unuopaj eksponaĵoj kaj pri ilia funkciado. Post la interesa spektado ni fortigis nin en loka restoracio Nový dvůr (Nova Korto) kaj direktis nin al la hejmo.

La semajnfino estis sukcesa kaj ni opinias, ke ĝi kontribuis al reciproka riĉigo kaj ekkonado de laboro kaj interesoj de ĉiuj partoprenantoj. Jam nun ni kun ĝojo atendas pluan komunan aranĝon.

M. Sýkora
teksto kaj fotoj



Petr Jonáš transprenas Plakedon de Litomyšl

Petr Jonáš

Esperantisto honorigita de la urbo Litomyšl

Petr Jonáš naskiĝis en Litomyšl kaj loĝas ĉi tie la tutan tempon. Sian 80-an naskiĝtagon li festis meze de majo.

Jam kiel lernanto li lernis la violonludon kaj kantis en la lerneja koruso. Post finstudo en la Gimnazio de Litomyšl li daŭrigis siajn studojn en la Pedagogia Instituto en Pardubice. Poste li instruis en ĉiuj elementaj lernejoj en Litomyšl kaj ĉirkaŭaĵo, inkluzive de Svitavy. De sia junaĝo li ludis piedpilkon kaj ŝakon kaj dum 62 jaroj - ekde la gimnaziaj studoj - li kantas en la koruso Vlastimil. Ties kronikon li verkas jam 40 jarojn. Dum 42 jaroj li estas aktiva organiza membro en atletiko. Li funkcias kiel arbitracianto kaj ĉiumonate verkas por la loka gazetaro "Atletikan fenestron".

Li estas la sola aktiva esperantisto en Litomyšl, kie li ĉiĉerone gvidas ĉeĥajn kaj eksterlandajn esperantistojn. Esperanton li lernis en koresponda kurso. Nuntempe li estas membro en Klubo de Esperanto-Amikoj Svitavy. Li laboras kiel montara gvidisto por la Informcentro, sed ankaŭ eksterlande, ekz. en Parizo, Vieno aŭ Krakovo. Li estas kolektanto de poŝtkartoj.

Pro sia riĉa agado kaj kontribuo al la urbo li ricevis de la urbestro Plakedon de Litomyšl en ceremonio la 2-an de majo 2024. La Koruso Vlastimil komponis kaj kantis dankokanton al Petro por tiu ĉi solena momento.

Libuše Dvořáková
Foto M. Sýkora

Výsledek hospodaření ČES za rok 2023, plán na rok 2024
a přehled o majetku, pohledávkách a závazcích (v Kč).

Příjmy	**pl.2023**	**sk.2023**	**pl.2024**
Příspěvky na běžný rok	11 000	12 570	11 000
Příspěvky na budoucí rok	18 000	16 190	18 000
Dary členů	10 000	11 845	10 000
Dary nečlenů		25 000	
Dotace		0	
Starto předplatné		723	
Konference a sjezdy	80 000	113 980	52 500
Činnost klubů a sekcí bez PS		0	
Muzeum		0	
Libroservo	19 000	4 523	18 000
Kurzy esperanta	2 000	1 600	4 000
Příspěvky UEA ind. běžný rok		0	
Příspěvky UEA ind. bud. rok		17 960	
Platby UK na běžný rok		41 366	
Platby UK na budoucí rok		16 530	
Platby ILEI a pedagog. komise		620	
Úroky z účtů	20 000	18 546	17 000
Virtuální adresa		0	
Služby svazu		180	
Příjmy celkem	**160 000**	**281 633**	**130 500**
Výdaje	**pl.2023**	**sk.2023**	**pl.2024**
Starto tisk	24 000	23 784	24 000
Starto distribuce	17 000	17 899	20 000
Konference a sjezdy	80 000	115 775	54 300
Činnost klubů a sekcí bez PS	5 000	6 360	3 000
Provoz ČES, internetové služby	2 500	2 528	2 500
Jízdné funkcionáři	5 000	902	4 000
Přísp. na stravné za schůze	700	300	1 000
Muzeum	20 000		15 000
Libroservo nákup zboží	19 000	2 153	70 000
Libroservo poštovné a balné	300	0	300
Kurzy esperanta	300		300
Příspěvky UEA ind. běžný rok		24 880	
Příspěvky UEA ind. bud. rok		0	
Platby UK v běžném roce		76 166	
Platby UK na budoucí rok		1 890	
Platby ILEI a pedagog. komise		0	
Kolektivní členství v UEA	1 500	1 485	1 500
Kolektivní členství v EEU	1 300		1 300
Blahopřání, kondolence	1 500	312	2 000
Poplatky		0	
Daň z úroku	3 800	3 524	3 800
Nový majetek	50 000	1 128	10 000
Výdaje celkem	**231 900**	**279 086**	**213 000**

Přehled o majetku, pohledávkách a závazcích k **31.12.2023**	
peněžní prostředky	
pokladna korunová	0
pokladna eurová	0
ceniny	0
účet Fio	350
účty Fio spořící a termínované	492 086
peníze celkem	**492 436**
změna vůči 31.12.2022	*19 206*
investice	
podílové listy	174 685
investice celkem	**174 685**
změna vůči 31.12.2022	*51 627*
pohledávky	
UEA subkonto	61 795
	0
pohledávky celkem	**61 795**
změna vůči 31.12.2022	*-5 752*
ostatní majetek ČES	
drobný majetek v ceně pořízení	211 022
knihy v libroservu (inventura)	135 515
ostatní majetek ČES celkem	**346 537**
změna vůči 31.12.2022	*-8 872*
závazky	
UEA subkonto	0
platby pro UEA	30 710
závazky k členům	0
závazky celkem	**30 710**
změna vůči 31.12.2022	*-28 970*
účelově vázané prostředky	
fond Tilio	27 392
fond ediční	12 660
fond Cigno	21 388
sekce nevidomých	20 279
klub Mladá Boleslav	16 618
klub Ratíškovice	8 246
pedagogická komise	6 288
klub Havířov	3 052
klub Písek	2 673
klub Česká Lípa	2 215
klub Benešov	1 557
klub Tábor	1 314
klub Přerov	1 366
klub Karlovy Vary	1 337
klub Opava	1 079
klub Vítkovice	992
klub Šumperk	641
klub Hranice	624
klub Ústí nad Labem	542
celkem	**130 263**
změna vůči 31.12.2022	-2 809

2024 – LA JARO DE ĈEĤA MUZIKO

Kial ni solenas ĝin ĝuste en tiu ĉi jaro? Ĉefe tial, ke per **1824** (2.3.) kaj **1884** (12.5.) estas limita la vivo de

Bedřich Smetana

la unua komponisto, kiu povas esti nomita

Kreanto de la ĉeĥa (nacia) muziko.



La *persona* signifo de Bedřich Smetana estas en tio, ke lin sieĝis ĉiuj malfavoroj kaj malgrandecoj (*Zdeněk Nejedlý, 1962).*

La *muzik-signifo* estas en lia batalo pri moderna ĉeĥa muziko *(Otakar Hostinský, 1900).*

(Rim..: En la eldiro troviĝas informo, ke jam en 1924 estis omaĝita la evento sub la sama nomo kiel ĉijare. M.T.).

En ambaŭ citaĵoj montriĝas la elemento „unueco“: B.S. elkreis la modernan ĉeĥan nacian muzikon – kaj la ĉeĥa muziko elkreis sian reprezentanton, kiu ĉiam en ĝi substrekas la frapan trajton – la ĉeĥecon!

Se ni rigardas en la historion, ni konstatas, ke la plena signifo de B.S. montriĝis en la etapo por nia lando plej malfacila: en la jaroj de la Dua mondmilito. Li fariĝis onidire „politika reprezentanto de sia popolo“. La prezentado de la opero „Libuše“- pro siaj profetdiroj; kaj la patrioteca simfonia poemaro „Má vlast“, en la Nacia teatro, kaŭzis popolajn manifestaciojn, do estis malpermesitaj.

Se ni volas ekscii pri la fontoj de ambaŭ fenomenoj – do pri Bedřich Smetana kaj pri ĉeĥa nacia muziko, ni citu la tekston de la aŭtoro plej elstara – Zdeněk Nejedlý. Por laŭvere pripentri la portreton de Bedřich Smetana kiel personulo kaj Lian muzikon li diras: „Ŝajnas, ke en la muziko de B.S. estas parto de nia artisto: en ĝi sonas tio, kion ni konas el Mácha, el Němcová, el Neruda… kion ni havas en Mánes, en Aleš… Lia muziko estas al ni tiom proksima, ke ĝi ŝajnas enhavi en si parton de ĉiu el ni; de ordinara homo el popolo ĝis la plej renoma fakulo en artoj ni ĉiuj trovas en la muziko de B.S. sin mem; kaj tio nin ĝojigas.

Tiom vasta, pro siaj internaj mondoj amasplena, estas la verkaro de B.S. Li estas la plej granda en sia artosfero, la plej granda pro sia interna forto, per kiu manifestiĝas absoluta genialeco.

Ju pli en la verkon de B.S. ni profundiĝas, des pli bone ni malkovras Lian individualecon, Lian artan personecon. B. S. por ni jam ne plu estas la modesta, lirik-mola, „ĉeĥe malkuraĝa“ artisto, kiel eble pri Li opiniis la samtempuloj de Liaj junaj jaroj. Antaŭ nia interna vido elstariĝas granda personulo de mirega energio kaj pozitivaj ecoj; pli kaj pli alten, ĝis la art-fenomeno de heroeca forto. De la kreoenergio kaj kreopasio ekbruliĝinta kaj brulanta GENIO.“

Por la muzik-genieco de B.S. ne sufiĉis nur niaj malgrandaj landoj, la limoj naciecaj. Ne! Li tuj altiĝis en la sferojn de granda arto tutmonda.

Nur de tiuj Li povis ĉerpi por si fasciigon kaj krean fortigon. La Patrolando – almenaŭ koncerne la artflankon – povis doni al Li nur malmulte, kio ne povis al B.S. sufiĉi; ne al Lia sopiro je la arto la plej alta… Ne malgrandaj muzikistoj, sed Mozart kaj Beethoven, la romantikistoj (kiel Schumann) kaj nov-romantikistoj kiel Berlioz, la kreantoj de la moderna muziko kiel Liszt kaj Wagner, kaj apud ili tiel proksima Chopin – tiuj estis Liaj kunuloj, en kies artosfero Li elkreskis kaj vivis. Jenan grandecon kaj noblecon, kaj sian grandan varmon kaj pasian amon al la Patrolando Li kumulis, kaj el tio Li kreis

modernan ĉeĥan nacian muzikon.

Kio ja estas „la ĉeĥa nacia muziko“ kaj kiel Li komprenis la aferon kaj sian taskon en ĝi?

Li estiĝis *nov-romantikisto.* Li tre aprezis la romantikistojn, (kiel jam dirite – ekz. Schumann), kies verko estas lirika, etos-plena. Sed lin eĉ pli allogis la verkoj de Liszt, de Wagner – en kiuj estas „programo“. Do, ambaŭ elementojn li ensuĉas – kaj siajn verkojn li konstruas „programaj sur lirika bazo“… Li kreis 8 operojn kaj el ili la romantiko ĝuste „elŝprucas“… Kaj ne nur en la operoj.

La programon enhavas ĉiuj Liaj verkoj – ĉu simfonioj, ĉu opusoj kameraj kaj aliaj. Ili estas proksimaj ankaŭ por laikaj aŭskultantoj. Oni „legas“ en ili kaj ilin ĝuas.

Ni mencias la „mondecon“, sed ni parolu, kiaj estas trajtoj de la ĉeĥa muziko…

B.S. vivis en la etapo de nacia reviviĝo, kiam montri la patriotecon estis la ĉefa postulo de ĉiu loĝanto. Kio koncernis la muzikon – oni rekte postuladis, ke ĝi estu nacia, t.e. ĉeĥa – ke en ĝi rekte sonu la naciaj, do popolaj, melodioj.

La nobla animo de B.S. tion komprenis alie – la postulon li kaptis tute nov-konforme; kun alta muzik-inteligenteco. Li en ĝin enlaboris popolan melodikon, kiun ni aŭdas en ĉiuj liaj komponaĵoj – ĉu romantikaj – ĉu lirikaj – ĉu heroikaj…

Ke en la ĉeĥaj landoj estas la plej ŝatata verko **Prodaná nevěsta**, tio estas stato konata kaj daŭripova. Ĉar ĝuste tiu ĉi komponaĵo estas „la kvintesenco“ de nacieco kaj romantismo. Sen plua eksplikado ni komprenas, kion la nocioj signifas…

Kaj kun la sama amo estas akceptata (kaj ne nur ĉe ni) la verko de karaktero liriko-heroika: la simfonia poemaro **Má vlast**…

Preskaŭ tuŝas nin (aŭ ni tuŝas) la objektoj de la simfonio, ĉar ili troviĝas ĝuste „post niaj dorsoj“. La vorteksplikoj helpu nin plene kapti tiujn en la muzika senco…

1. Vyšehrad

La harpoj de profetoj kaj la kanto de profeto parolas pri eventoj sur Vyšehrad – la unua sidejo de slavaj suverenoj; pri ĝia glora historio, pri turneoj, pri bataloj – ĝis la fina malkresko de la burgo kaj ĝia ruiniĝo. La komponaĵo finiĝas per elegia melodio…

2. Vltava

Kiel B.S. mem esprimiĝis: „La komponaĵo bildigas kuron de la rivero – komence el malgrandaj fontetoj (mal-varma kaj varma Vltava), poste kuniĝo de ambaŭ en unu rojeto, poste fluo de Vltava tra boskoj kaj herbejoj, tra landregionoj, kie popolanoj ĝuste festas sian tradician eventon; ĉe nokta lumo – svarm-dancado de najadoj;

sur la apudstarantaj rokoj elstariĝas fieraj burgoj, kasteloj kaj ruinoj; ĝi fluas pluen – al Prago – en ĝia vasta torento speguliĝas Vyšehrad, kaj trairante la urbon ĝi malproksimiĝas de ni, de ni… kaj elfluas en la majestan riveron Labe.

La celo de B.S. estis bildigi Vyšehrad kiel simbolon de la pasintaj epokoj kaj daŭrigon de la ĉeĥa lando en la bildo de „nemova elemento“. Dum Vltava estas „vejno“ de la lando, trairanta koron de la Patrujo, tuŝanta Vyšehrad – do ĝi estas mem la bildo de la vivo… La melodio ne estas malproksime al varmaj tonoj de popolaj kantoj.

3. Šárka aliĝas al la antaŭaj du Poemoj same nature, kiel la prikantita loko situas reale, nature…

La samaj rokoj, kiuj fariĝis la unuaj loĝantarsidejoj slavaj, estas motivo de la evento-legendo pri la knabino Šárka, kiu pro malfideleco de sia amanto Ctirad tiom furioziĝis, ke ŝi proklamis venĝon al la tuta virgento. De malproksime aŭdiĝas alveno de Ctirad kaj de liaj armitaj kunuloj; la trupo celas puni kaj subigi knabinojn. Aŭdeblas plorĝemo (falsa) de unu knabino, kiu estas alligita je arbo. Ctirad admiras ŝian ĉarmon, amflamiĝas kaj ŝin liberigas; pere de preparita trinkaĵo ŝi gajigas lin kaj liajn kunulojn, ĝisdorme… Je la signalo (ĉaskorno) elsvarmiĝas kaŝitaj knabinoj por fari sian sangan agon; teruro de amasa mortado, furiozeco de la venĝema Šárka… Fino de la komponaĵo.

Por la premierkoncerto de Vltava (aprilo 1857) gajnis B.S. financan sumon kaj li povis vojaĝi eksterlanden en la espero, ke tie eblas resaniĝo de Lia aŭdmalkapablo. La espero estis vana – la malsano pli kaj pli malboniĝis. La familio translokiĝis en la Mladá Boleslav-regionon, nome en Jabkenice-n, kie Josef Schwarz, la bofilo de B.S., havis forstistan domon. Malgraŭ kuracista malpermeso, Li tuj komencas krei pluan simfonian poemon:

4. Z českých luhů a hájů

Ĝi estas certe Lia plej ĉarma opuso…

Pri ĝi B.S. eldiras jenon: „Tio estas pentrado de sentoj kiajn oni havas alrigarde de nia lando. El ĉiuj flankoj, el boskoj kaj herbejoj, sonas kant-melodio plena je varmeco – jen gaja – jen melankolia; arbaraj kaj rikoltdonaj regionoj – jen la lando ĉirkaŭ la rivero Labe estas prikantata… la poeto havas tute liberan imagon antaŭ si…“

La konstruo de la Poemoj **5. Tábor kaj 6. Blaník** sur la motivoj de la husana himno „Kdož sú Boží bojovníci“ signifas manifestiĝon kaj aprobon de B.S. al la principo de husanoj. La himno certe estis multofte kantita en la ĉefa sidejo de husanoj – en la urbo Tábor.

Blaník estas daŭrigo de **Tábor**.

B.S.: „Post malvenko la herooj husanaj kaŝis sin en la monto B. Kaj en profunda dormo ili atendas momenton por helpi al la Patrujo.“

Rim. Laŭ ĝenerale konata legendo la gvidanto de Blaník-kavaliroj estas la patrono sankta Václav. Sed ne estas sciate, ke laŭtradicie (de la 15a jrc.) la estro estas Jan Žižka. Nur la cenzuro en la 19a jrc. anstataŭigis lin je Václav, kiel en nun konata legendo.

Bedřich Smetena ne timis aprezi la husanan legendon kaj kuraĝe dediĉis la verkon al La Reĝa Ĉefurbo Prago. La reprezentantoj eĉ ne dankis Lin.

La komponaĵo „Má vlast“ ĉiujare, je la 12-a de majo, malfermas la internacian muzikfestivalon *Pražské jaro*.

Margit Turková, en marto 2024

Ĉi-foje la IFEF-kongreso estis iom speciala. Ĝi okazis kadre de la Eŭropa Esperanto-Kongreso 2024.

Laŭplane okazis ĉiuj kutimaj programeroj de IFEF: diversaj prelegoj pri fervojo kaj kunvenoj de la fakaj asocioj.

La venonta IFEF-kongreso okazos en Žilina (Slovakio).

Oni povis profiti ĉiujn programerojn kaj vesperajn muzik-koncertojn.

Estis organizitaj pluraj vizitoj al la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Kelkaj fervojistoj, sub gvido kaj interpretado de Bruno Henri, povis viziti vivantan fervojon apud la stacidomo de Strasburgo.

Temis pri riparejo de lokomotivoj, motorvagonoj kaj pasaĝervagonoj uzataj por regionaj trajnoj *TER SNCF*. La nomo de tiu trako estas "Technicentre Grand Est".

Alia grupo povis viziti fervojan muzeon en Mulhouse la 10-an de majo. La post-kongreso celis la belan alzacan urbon *Colmar,* kie en la jaro 2017 okazis sukcesa 69-a IFEF-kongreso.

Liba Gabalda

POLYGLOT GATHERING

Inter la 15-a kaj la 19-a de majo 2024 en la Ekonomia Altnernejo en Prago 3 - Žižkov okazis jam pluran fojon la plej granda internacia evento por poliglotoj kaj lingvoŝatantoj. En ĝia programo estis instigaj prelegoj kaj prezentoj, kulturaj kaj amuzaj societaj programoj. Sed allogis precipe la ebleco por liberaj diskutoj kaj interparoladoj en la plej diversaj lingvoj de la mondo. Ĉi-jare kunvenis 735 interesatoj el 71 landoj kaj vivantaj en 55. Komune ili parolis pli ol 172 lingvojn.

La evento destinitas ne nur por studentoj, pedagogoj kaj scienculoj, sed ankaŭ por amatoraj entuziasmuloj. Kiel ĝi rilatis al Esperanto kaj per kio ĝi povas esti inspira por ni?

Mi povis partopreni nur unusolan tagon kaj vesperon kaj almenaŭ gustumi la etoson kaj la programerojn. Por komenca orientiĝo – kiel entute eblis ekscii, kiun homon en kiu lingvo alparoli? Ĉiu surhavis grandan karton kun sia nomo kaj devenlando kaj hierarkie ordigitaj lingvoj aŭ grado de posedo ekde D(enaska) ĝis A1 (komencanta), signitaj per landflagetoj. Iuj havis nur tri lingvojn, aliaj pli ol dudek. Vi mem povis noti nur tiujn, en kiuj vi vere volas komuniki.

Mi partoprenis ekz. unuhorajn enkondukojn al la hungara kaj finna lingvoj. Laŭ tiaj modeloj estus por ni inspire kaj utile pretigi ion similan en la ĉeĥa lingvo ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ por t.n. Lingvofestivaloj, okazantaj la 26-an de septembro kadre de la Tago de la Eŭropaj Lingvoj, en iuj ankaŭ Esperanto povus esti inkluzivita. Forte kaptis min prelego de juna bulgarino Olga, kiu parolas 13 lingvojn kaj profesie ludas 4 muzik-instrumentojn (inkl. orgenon) – kaj – estas denaske blinda. Lerte ŝi mem gvidis sian komputilan prezenton kaj bele kantante montris, kiel taŭgaj kantotekstoj povas helpi ekregon de malfacilaj fonetikaj aspektoj de diversaj lingvoj – tion ŝi demonstris ekz. en la norvega kaj la sveda. Ŝi restos por mi certe motiviga ekzemplo en situacioj, kiuj ŝajnos al mi komplikaj por solvi. Dum la antaŭvespera karaokeo la kuraĝuloj diverslingve kantis siajn favoratajn, kutime konatajn aŭ melodie facilajn kantojn, kies teksto aperis sur la ekrano kaj la ĉeestantoj povis kunkanti. Tiel mi povis gustumi enbuŝe eĉ lingvojn por mi nekonatajn, ekz. la rumanan aŭ la turkan. Jen ankaŭ bona inspiro por niaj Esperanto-aranĝoj – karaokeoj por pluraj kantoj pretigeblus ne malfacile.

La unua PG okazis en 2014 en Berlino, iniciatite i.a. de Chuck Smith. Ekde 2017 la eventon organizas E@I, kiu okupiĝas pri evoluigo de diversaj edukaj, ne nur lingvaj, projektoj. Ĝia kunordiganto estas ĉe ni bone konata Peter Baláž, i.a. prezidanto de SKEF kaj organizinto de famaj aranĝoj KAEST kaj SES. En marto 2024 la kunveno okazis unuafoje ankaŭ en *online* formo kaj en majo unuafoje en la ĉeĥa ĉefurbo.

La eventon Petro brile kunorganizis kun sia 30membra teamo, en kiu multaj parolis Esperanton. Dank' al li Esperanto estis vere videbla – ne nur pro pluraj prelegoj en la lingvo mem, sed pro la informpanelo en la akceptejo kaj ĉar ĉiu partoprenanto ricevis en sia sako flugfolion pri Esperanto kaj pri UEA kaj skribilon kun Esperanta surskribo.

Posttagmeze estis tempo por t.n. Lingvotabloj, ĉe kiuj dum unu horo alterne renkontiĝis homoj kun intereso praktiki konkretajn lingvojn (eĉ tre ekzotikajn). Tiuokaze mi povis renkontiĝi kun pluraj ĉeestantaj esperantistoj – i.a. el Malajsio, Slovakio, Aŭstrio, Serbio, Germanio kaj Irlando (surfote).

Agrablis la vespera internacia manĝofestivalo, dum kiu la partoprenantoj ĉe siaj standoj prezentis kaj gustumigis tipajn specialaĵojn aŭ frandaĵojn de sia lando.

La evento havas sian retpaĝon polyglotgathering.com, paĝon ĉe Facebook kaj videokanalon ĉe Youtube kun registritaj diverslingvaj prelegoj (inkl. Esperanton). Mi tre aprezas la ideon kaj ĝian profesiecan realigon kaj elkore dankas al Petro kaj la teamanoj kaj lokaj helpantoj el la klubo E-mental. Ankaŭ por ni esperantistoj temas pri defio – montriĝi al lingvoamanta komunumo ne kiel sekto de „ŝatantoj de unusola lingvo“ aŭ de lingvonekapabluloj. Ankaŭ ni povas riĉiĝi per ekkono de lingvoj de la mondo kaj samtempe ne altrudiĝeme informi kaj montri praktike avantaĝojn de Esperanto. Tiu ĉi komunumo ne vere bezonas Esperanton por povi komuniki – tamen aperas poliglotoj, kiujn „nia“ lingvo ekinteresas, ĉu teorie, ĉu pro internacia reto de kontaktoj kaj alispeca komuniksento.

Pavla Dvořáková

Kverko de Zanáška

Rudolf Zanáška (1907-1954) estis fondinto de esperantismo kaj skoltismo en Kopřivnice. La 12-an de junio 2024 okazis rememoro de lia tragika morto antaŭ 70 jaroj: skoltoj kaj esperantistoj signis per tabuleto kun lia nomo unu el la kverkoj en la esperantista memorloko de la skolta centro.

Esperanto senlime

Kvankam Esperanto ne havas televidon, eblas en Jutubo prezenti filmetojn de televida karaktero. TEJO kun subteno de Eŭropa Unio lanĉis serion de tiaj filmetoj sub titolo **Esperanto senlime**.
https://www.youtube.com/watch?v=9Ezld93TqMw

Asocio Nova Familio

subtenas 70 infanojn ĉe la bazaj lernejoj, 70 geknabojn ĉe la mezaj lernejoj kaj 10 gejunulojn ĉe la universitatoj per havigo de lernmaterialoj. Vidu:
https://www.esperanto.de/eo/asocio-nova-familio-eo

ČELIAUSKAS PETRAS

(1929-2024)

HONORA MEMBRO DE UEA

forpasis la 2-an de junio 2024, en la aĝo de 95 jaroj, litova Esperantisto, instruisto, tradukisto, redaktoro, publicisto, landesploranto, aŭtoro de grandaj vortaroj kaj de 520-paĝa libro de liaj artikoloj kaj tradukoj.

D-ro Vytenis Andriukaitis

litova esperantisto (*1951), estis **re-elektita parlamentano** de Eŭropa Parlamento. En la jaro 2016 dum UK en Nitra li prelegis en la lingvopolitika konferenco je la temo *Perspektivoj de lingva komunikado en Eŭropa Unio*. La parolado estas trovebla en la interreto en pluraj lingvoj (angle, dane, Esperante, france, nederlande) ĉe la retejo:

https://mallonge.net

Konferenco Česká Třebová

27. – 29. 9. 2024

Střední škola technická a dopravní Gustava Habrmana, Skalka 1692, Česká Třebová 560 02

Programo:

Vendredo 27.9.:

17 h Malfermo de akceptejo
18 h Vespermanĝo
20 h Bonvenigo de partoprenantoj, speciale el retaj kursoj, prezento de Česká Třebová kaj loka Esperanto-muzeo, informoj pri UK Aruŝa, diskuto pri „Misinformado en la nuntempa mondo“.

Sabato 28.9.:

8 h Matenmanĝo
9 h Membrokunveno de ĈEA
12 h Tagmanĝo, komuna fotado
13 h Promeno tra Česká Třebová, rotondo de Sankta Katarino, Kafejo Esperanto
18 h Vespermanĝo
18.45 h Kafo kun komitatano
19.30 h Societa vespero kun muziko kaj tombolo

Dimanĉo 29.9.:

8 h Matenmanĝo
9 h Daŭrigo de membrokunveno kun UK Brno kiel ĉefa temo, diskuto, rezolucio
11.30 h Tagmanĝo, forveturo

Partoprenkotizo

A. **600 CZK** – Baza partoprenkotizo
B. **400 CZK** – Baza por membro de ĈEA, ĈEJ aŭ SKEF aŭ partoprenanto de kurso
C. **300 CZK** – Avantaĝa por membro de ĈEA, ĉEJ aŭ SKEF aŭ partoprenanto de kurso paginta ĝis 2.9.2024 (inkluzive)
D. **0 CZK** – Honora membro de ĈEA, nevidanta membro de ĈEA kaj akompano, komitatano, organizanto, administranto de Libroservo, fininto de reta/koresponda kurso.

Rabato 50% por junulo ĝis 26 jaroj.

Avantaĝa paketo de kompletaj servoj

A. **1450 CZK** - 2 tranoktoj en 2-3-lita ĉambro kaj manĝo de vespermanĝo vendrede ĝis matenmanĝo dimanĉe
B. **1770 CZK** - 2 tranoktoj en 1-lita ĉambro kaj manĝo de vespermanĝo vendrede ĝis matenmanĝo dimanĉe
C. **590 CZK** - Komitatano, organizanto, administranto de Libroservo - 2 tranoktoj en 2-3-lita ĉambro kaj manĝo de vespermanĝo vendrede ĝis matenmanĝo dimanĉe

Aliĝilo elŝutebla ĉe

http://www.esperanto.cz/eo/akce/konferenco-de-ea-1459.html

Vedení ČES informuje

k čemu využijeme váš dar

V letošním roce jsme se po pečlivém zvážení rozhodli pro dva finančně náročnější projekty.

1/ vydání oboustranného slovníku v rozsahu cca 200 stran



Důvody k vydání jsou dva. V roce 2025 se v Brně bude konat největší celosvětové setkání esperantistů tzv. Universala kongreso. Je možné, že tato akce přivede k esperantu další zájemce o jazyk a jeho studium.

Druhým důvodem je, že hlavní vydavatel esperantských knih v České republice Petr Chrdle postupně ukončuje činnost a aktuálně nemáme informace o nikom, kdo by vydání slovníku v nejbližších letech zvládl organizačně, technicky i finančně zajistit. Vedení svazu tedy vydání slovníku vnímá jako investici do několika budoucích let.

2/ vydání učebnice Stana Marčeka Esperanto přímou metodou

Na jaře 2024 ČES ve spolupráci s předsedou brněnského klubu Milanem Kolkou zorganizoval 10ti hodinový online kurz pro začátečníky. Při té příležitosti se ukázalo, že počet dostupných učebnic Esperanto přímou metodou od Stana Marčeka je méně než dvacet. Rádi bychom kurz pořádali do budoucna, jiné učebnice pro skupinový kurz nejsou tolik vhodné.



Z toho důvodu jsme se rozhodli pro dotisk učebnice s laskavou pomocí Petra Chrdleho před jeho zaslouženým vydavatelským důchodem.

Cenová politika u obou knih je nastavena tak, že vydání knih bude pro svaz ziskové. To ale předpokládá prodej většiny z celkového nákladu, a to vzhledem k jeho velikosti bude trvat několik let. Svaz má tak ve vydaných knihách vázané peníze, které nemůže využít jinde. Váš dar tak umožní získat prostředky pro další aktivity svazu.

Tímto také děkujeme všem dárcům, kteří fungování svazu již podpořili, či tak činí pravidelně. Svaz je z drtivé většiny financován z příspěvků svých členů a jeho příznivců.

Finanční dar můžete zaslat na účet číslo 2800186228/2010 a jako variabilní symbol uveďte číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie) doplněné číslem 06943. Pokud nejste členy Svazu nebo chcete zaslat dar anonymně uveďte jako variabilní symbol jen 06943.

SME pri Stano Marček

La slovaka gazeto MY Turiec SME publikigis la 12-an de junio 2024 artikolon de Monika Maruňáková pri Stano Marček sub titolo **Kapelu TEAM dostal na Západ, manželke zohnal lieky na ťažkú chorobu. Vďačí za to esperantu. Vďaka esperantu procestoval celý svet.** (*La muzikgrupon TEAM li venigis al Okcidento, por sia edzino li akiris kuracilon kontraŭ grava malsano. Li dankas tion al Esperanto. Danke Esperanton li travojaĝis la tutan mondon*).

La artikolo troveblas en la interreto, serĉu per Guglo.

Du interesaj aranĝoj en ĉeĥa Esperantujo

Ĉi maje mi partoprenis du aranĝojn, kiuj ŝajnas al mi esti signifaj:

Komence de majo okazis lastfoja prezentado de la unua Esperanto-opero **Sternenhoch**. Oni prezentis ĝin ses jarojn (2018-2024) en Nova Scenejo de Nacia Teatro, kaj ĉiam la spektejo estis plena.

La operon verkis ĉeĥa komponisto Ivan Acher, reĝisoris Michal Dočekal kaj la ĉefajn rolojn aktoris kaj kantis Sergej Kostov (Sternenhoch), Vanda Šípová (lia malamata edzino) kaj juna aktorino kaj violistino Tereza Marečková (sorĉistino Kumhist). Apud ili prezentis sin pluraj eminentaj kantistoj de Nacia Teatro.

La tekston de la opero nekredeble trafe kaj precize esperantigis Mirek Malovec, kiu estas do unu el la kreantoj de la verko.

La opero finiĝis en la Nova Scenejo, sed ĝi iĝis tia fenomeno, ke ĝin transprenas Urbaj Teatroj Pragaj, kiuj daŭrigos prezentadon de ĝi.

La adiaŭo kun la opero estis majesta, la spektantaro nefinante aplaŭdis starante.

Ni, du anoj de la komitato de ĈEA, pere de vino-donacoj kaj bukedo dankis al la kantistoj, reĝisoro kaj dirigento nome de ĉeĥaj esperantistoj pro neatendite sukcesa prezentado de la opero.

Fine de majo okazis lanĉo de nova libro **GOLEMO** (197 Kč), onidire lasta esperanta eldonaĵo de KAVA-PECH, de konata, ŝatata verkisto Eduard Petiška (1924-1987). La solenaĵo okazis en praga E-klubo. Ĉeestis Vladimír Türk, tradukinto en Esperanton, Petr Chrdle, eldonisto, kaj la ĉefa persono – Martin Petiška, filo de Ed. Petiška. Ilustrantino Mirka Tomečková bedaŭrinde ne povis veni.

Pavla Dvořáková bonidee kompilis la programon de la kunsido – variis rakontado kun lumbildoj pri vivo kaj verko de Ed. Petiška, pri vivo kaj verko de Martin Petiška, ankaŭ verkisto, kun kantado kaj interparolo de Martin Petiška. Li interese, altire rakontis pri sia patro, pri si kaj sia verkado, ankaŭ li volonte respondis demandojn de la (ĉi foje) multnombra klubanaro.

La kunveno kun tiu ĉi programo estis mojosa!

LChal

Rimarkigoj:

■ Pri Golemo vi povas aŭskulti videon kaj ankaŭ pri Jan Fidel Řepa, ambaŭ de Vladimír Türk

■ Laŭ lastaj informoj la operon Sternenhoch eble transprenos alia teatro en Prago

NIAJ POETINOJ CENTJARIĜIS

Eva Seemannová * 1921
Eli Urbanová * 1922
Marjorie Boulton * 1924

Sed ne ĝisvivis
E.S. † 1990
E.U. † 2012
M.B. † 2017

La du ĉeĥajn poetinojn ni omaĝis en la koncernaj jaroj; en la manoj ni havas ALMANAKON, kiun jubilee al Eli Urbanová eldonis la eldonejo KAVA-PECH. Rilate la angla-devenan Marjorie Boulton – ni havas ŝian naskiĝ-jubileon antaŭ ni.
Ĉiuj prezentitaj datumoj igas nin ne nur rememori, sed eĉ kompari la poet-grandulinojn…

Eva Seemannová

Profesia teatro-artistino.

Pri poezio ŝi okupiĝis malmulte, nur laŭokaze. Tamen ŝi estis premiita internacie por la poemo „Mia konfeso“. La tutan vivon ŝi „konfesis“ pri si mem nur per teatro-formaj manieroj: ĉu en sia patrolando, ĉu en la esperantujo internacia. La poezion ŝi abunde disvastigadis pere de deklamado.

Pri siaj privataj, eĉ intimaj, aferoj ŝi neniam esprimiĝis publike. Pasieme ŝi „brulis“ nur pere de siaj teatro-heroinoj.

Deca en sia kutima vivo – pasiema en sia arta vivo…

Svelta, eleganta virino, kritikema al si mem kaj al aliaj…

Pri sia okupado tre fiera, al sia aŭskultantaro ekstreme sindonema…

Eli Urbanová

Instruistino, edukistino. E-akademianino. „… estas mi seks-bomb´…“ elŝprucas el unu ŝia poemo…

Kaj nedube – el ĉiuj fotografaĵoj, kiuj estas haveblaj, videblas la virino, al kiu tia epiteto „sidas“. De ŝia junaĝo ĝis la lastaj vivjaroj ni vidas allogan belulinon, por kiu la AMO en ĉiuj formoj estis la vivsuko. Pri ĝi ŝi pripensadis, meditadis, publikadis. Kaj ĝin ĝuis. Tiu temo estas la trajto karakteriza koncerne la personecon kaj same la kreadon de la aŭtorino. Se oni volus (laike) envicigi ŝian poemaron en ian kategorion, do „ktg. Erotika“. Sur la amaseto da poezi-volumetoj sidas la famkonata romano „Hetajro dancas“. Unusola skribita en prozo – kaj plej erotika. Post kiam la libro tralegiĝis, elstaris la demando: „… ĉu tiom da intimaĵoj la esperantujo eltenos…“

Parafraze ni starigu la saman demandon, se ni vidigos la poemon

Abismo de ekkono
Mi diros tion simple, ĉar simple ĝi okazis.
Sentante malantaŭe
momentan tiklon strangan,
mi volis scii veron…
Mi tuj, tuj ĉion lasis,
kaptis murspeguleton,
jes, eĉ lupeon grandan…
Kiam mi min esploris,
mi iel senintence
alŝovis ambaŭ aĵojn
pli supren al la sino…
Terura nun abismo
Ekfaŭkis min potence.
Do tie mi promenas,
Do tie, en vagino!

Marjorie Boulton

El la biografio ni eksciu, ke Ŝi studis en la Oksford-universitato, kaj poste Ŝi estiĝis profesorino (en la sama kolegio), kie Ŝi instruis la anglan lingvon kaj literaturon. Kiel siajn instruistojn Ŝi rememoras la famajn verkistojn C.S.Lewis kaj J.R.R. Tolkien. Multajn pensojn Ŝi redediĉis ankaŭ al siaj studentinoj, pro kiuj Ŝi montris empation kaj sian poezi-spritecon.

Jen plej trafe Ŝi karakterizas sin mem:

La triopa MEMO

Mi estas tri. La digna lektorino

kun la krajon´ kritika libron legas.

En nigra robo, pri la origino

de l´dramo primitiva ŝi prelegas.

Dume, en koro, primitiva dramo

okazas; ĉiam freŝa kaj terura;
sub nigra robo brulas nun pro amo
virino simpla en dezir´ tortura.

La lektorino pensas. La virino

baraktas, krias, nur angoron sentas.
Sed la poet´per arta disciplino
observas ilin ambaŭ – kaj komentas.

Koncerne Esperanton:

La Lingvon Ŝi eklernis en la jaro 1949 (en 1957 Ŝi fariĝis akademianino) kaj jam Ŝi videbliĝis per jenaj verkoj:

- La biografio pri LLZ
- La Lingvo-sciencaj eseoj
- Anatomio de l´poezio (1953)
- Anatomio de l´prozo (1954)
- Anatomio de l´dramo (1960)
- Anatomio de l´lingvo (1968)

Kaj ŝi startigis sian talenton de poezia verkado (en la angla kaj en Esperanto).

Okaze de Ŝia jubileo eldonis la Esperanto-asocio de Britio duvoluman kolekton de poezia verkaro (kun redaktaldonoj entute 1212 paĝoj) – UNU ANIMO HOMA.



Malgraŭ la „griza“ profesoraspekto oni ĝuas la spiritan kaj intelektan riĉecon, kiu kuŝis en tiu homeminentulino – kaj kiujn Ŝi kapablis transdoni al siaj legantoj…

Jam dekomence videblas, kiel forte Ŝi sentas la esperantistan kolektivon ĉirkaŭ si; precipe virkolegojn; ties amikecon, subtenon, estimindan verkotalenton kaj organizkapablon.

Ni ekkonas kelkajn, kiuj estas de Ŝi adorataj (Juan Régulo Perez, Ivo Lapenna, Gaston Waringhien – nur ekzemple). La tuta esperantistaro scias, ke inter la viroj, kiujn Ŝi plej „elstarigis“, estas Willam Auld. Sian rilaton ili publikigis en la volumeto, kiun oni konas sub la titolo „Rimleteroj“… Jam Ŝia komenca alnomigo – „Vilĉjo“ diras multon (certe ne ĉion)…

La volumeto (sur korespondkartoj) enhavas 84 rondelojn, en kiuj montriĝas spriteco, per kiu ambaŭ gepoetoj estis talentitaj…

Eble ĉiu poeto kreas en sia vivo unu verkon, kiu estas „pinta“; (ĉe W. Auld tio estas la „Infana raso“). La korespondado komenciĝas je propono de W.A. kaj per la vortoj: *„Epos´ NUNTEMPA – Grandiozo!“*... do, kio nin instigu pli ol tiuj vortoj legi la eposon (se ni volas plene estimigi la homan koncernon de la poetino)…

De Margit Turková, aprilo 2024

Letní esperantský tábor Lančov

27. setkání pamětníků v Lančovské zátoce

Srdečně Vás zveme na **27. setkání** bývalých účastníků tábora v Lančovské zátoce.
Setkání se uskuteční ve dnech **9.8. – 11.8.2024** tradičně v Letním esperantském táboře v Lančovské zátoce u Vranovské přehrady.

Navrhovaný program:
Pátek: příjezd, ubytování, večeře: 18:30, táborák – jak dlouho kdo vydrží
Sobota: snídaně: 8:30, společné foto, volný program – výlet
oběd, volný program, večeře: 18:30, táborák, v případě špatného počasí posezení v jídelně
Neděle: snídaně: 8:30, loučení, odjezd
Výlet: upřesníme později dle programu k 90. výročí Vranovské přehrady

Ceny:

Nocleh: á 160 Kč	320Kč
Lůžkoviny (možno vlastní)	75Kč
Stravování:	
Snídaně: á 40 Kč	80Kč
Oběd	130Kč
Večeře 9.8.	90Kč
Večeře 10..8. (1. i 2.)	130Kč

Zaplatit můžete předem na táborový účet č.ú. u Fio bank a.s, 2300386901/2010 VS 1952, do zprávy pro příjemce napište prosím Vaše jméno (pro identifikaci Vaší platby)
Kontakty:
Email: let.lancov@seznam.cz
olgalacinova@seznam.cz
Mobil:
+420 737 348 878 (Olga Lacinová)
+420 702 453 615

Omelka japane

Ĉeĥa verkisto por geknaboj František Omelka (1904-1960) kvar siajn verkojn mem esperantigis. Lian verkon *La Granda Admiralo* pri Fernao Magalhaens (Magellan), kiu ĉirkaŭvojaĝis la Teron kaj pruvis ĝian globecon, el Esperanto nun japanigis japana esperantisto Isikawa Kazuya (Kapao) kaj eldonis libroforme.

Jam en la jaro 2012 li eldonis japanan-esperantan version de *Alaska Stafeto*, ankaŭ de Omelka. Tamen la nova libro aperis nur japane. Kun tradukado helpis ankaŭ liaj kursanoj.

KAEST 2024 Žilina

Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko okazos ĉeeste ĉi-jare! Ĝin bonvenigos Žilina, bela urbo en la nordo de Slovakio, kie ankaŭ okazis la unua KAEST en 1978. La evento okazos ekde la **7-a ĝis la 10-a de novembro 2024**.

Jam eblas aliĝi! Info: kaest.ikso.net.

Ĉi-jare vin atendas:

- Fakaj prelegoj
- Paneldiskutoj
- Trejnadoj
- Eblo kunsidi por fakaj sekcioj kaj grupoj
- Vespera programo
- Vingustumado
- Ekskurso al la kastelo Budatín

La ĉeftemo de KAEST 2024 estas: "**Esperanto kaj lingvolernado en la epoko de artefarita intelekto kaj virtuala realo**".

Eksciu pli pri la loko, programo, kotizoj kaj aliĝu al KAEST 2024! La unua aliĝperiodo finiĝas jam la **30-an de junio**. Danke al la partnereco kun UEA, Individuaj membroj de Universala Esperanto-Asocio ricevas rabaton 20 EUR, do **ne forgesu indiki vian UEA-kodon** en la aliĝilo.

E@I-teamo invitas vin – ĉu aliĝi kaj prelegi aŭ simple aliĝi kaj ĉeesti en KAEST 2024. Por ke la faka vivo en Esperanto evoluu!

Se vi havas ajnajn demandojn, ne hezitu kontakti nin ĉe kaest@ikso.net.

Ĝis la revido en Žilina!

Amike, KAEST-teamo

Speak Dating Brno

estos aranĝo okaze de **Eŭropa Tago de Lingvoj** la 26-an de septembro 2024 inter la 16-a kaj 20-a horo sub la rajdista statuo de moravia markgrafo Jodoko Luksemburga en Moravia placo.

Ĉi-jare estis invititaj ankaŭ esperantistoj por prezenti **Esperanton** ĉe unu el la tabloj. Ĉiu tablo estos signita per flageto de koncerna lando aŭ lingvo kaj sidos tie lektoro scianta la lingvon. Interesatoj povas veni, sidiĝi kaj demandi pri ĉio, kio ilin interesas koncerne la lingvon.

Organizantoj estas Europe Direct Brno kun Eurocentrum Brno subtenataj de EURODESK. Sian lektoron sendos Klubo de esperantistoj Brno.

foto Peter Mikus

JUBILEANTOJ DE APRILO, MAJO KAJ JUNIO

PhDr. Dadáková, Střítež nad Ludinou
Magdalena Grimová, Opava
Petr Jonáš, Litomyšl
PhDr. Marie Kaufmann, Městec Králové
Antonín Krejčíř, Troubky nad Bečvou
Miluška Krejčová, Ústí nad Labem
Josef Kubálek
Ing. Martin Kump, Přerov
Ing. Jiří Novotný, Hynčice
Jan Řepa, Netolice
Ing. Renáta Sedláková, Praha
Milan Souček, Třebíč
Karel Stulz, Karlovy Vary
Věra Štěpánová, Ústí nad Labem
Jiří Toman, Prostějov
Iva Tomanová, Havířov
Karel Válek, Frýdek-Místek
Ing. Čestmír Závodný, Frýdek-Místek
Helena Matějková, Praha

Ĉion nur bonan - sanon, kontenton, sukceson en la vivo al ĉiuj jubileantoj!

Agado de la asocia komitato

Rete kunvenas ne nur la komitato (K), sed ankaŭ la redakcio (R) de la asocia retejo:

4.4. Kun Dorota kaj Peter Baláž kaj kluba prezidanto de Brno Milan Kolka la komitato traktis, kio estos necesa por UK 2025 en Brno.

8.4. La redakcio parolis pri la problemoj de la muzea retejo.

15.4. La komitato dediĉis sin al preparo de la asocia konferenco en Česká Třebová

21.4. Por UK 2024 en Aruŝa necesas prepari Unuan bultenon pri UK 2025 en Brno kaj disdoni al la kongresanoj.

9.5. La redakcio decidis meti en la domajnon informojn pri esperantistaj viktimoj de la dua mondmilito.

11.5. La komitato decidis, ke la konferenco en Česká Třebová okazos 27.-29.10.2024.

20.5. Milan Kolka gvidas la retan kurson laŭ lernolibro de Marček, sed necesas eldoni la lernolibron denove.

27.5. Kun klubestroj la komitato traktis pri programoj por konferenco en Česká Třebová kaj por UK 2025 en Brno

2.6. La redakcio preparos artikolojn pri Kuro por „Paraple“ kaj pri Martin Petiška, filo de Eduard Petiška.

8.6. La komitato kunvenis ĉeeste en Choceň. Ĝi aprobis novan eldonon de Marček-lernolibro, novan poŝvortaron de Malovec, traktis pri konferenco en Česká Třebová kaj pri UK 2025 en Brno (propono de LKK, kongresa temo, kongresa emblemo, unua bulteno).

Reta kurso de Esperanto

La komitato iniciatis retan kurson de Esperanto por 10 personoj, gvidas Milan Kolka laŭ la rektmetoda lernolibro de Stano Marček. Plie li gvidas en Brno ankaŭ ĉeestan kurson.

Esperantistoj el Svitavy vizitis kasteleton Karlštejn

Ĉu vi sciis, ke en Ĉeĥa Respubliko ekzistas du kasteloj Karlštejn? Kiu ne konus la burgon Karlštejn, kiun igis konstrui Karolo la IV-a en la 14-a jarcento kiel lokon por konservi la kronjuvelojn. Sed la alia Karlštejn estis konstruita kvar jarcentojn poste kiel ĉaskasteleto proksime de la urbo Svratka en regiono de Žďár-montetaro. Ĝuste la kasteleto Karlštejn, situanta preskaŭ 800 metrojn super marnivelo, iĝis celo de esperantistoj el Svitavy. Sabate la 25-an de majo 2024 ili ekveturis en aŭtoj al la kastelo kaj daŭrigis piede, dum agrabla suna vetero, por observi rokarojn de Žďár-montetaro.

Laŭ blua turisma marko ni pasis preter fontujoj de Grafino kaj Princo kaj atingis la unuan geologian formacion *Zkamenělý zámek* (Ŝtoniĝinta Kastelo). Temas pri grupo de rokaj blokoj, kiujn la homoj en la prahistorio uzis kiel fortikaĵon. Nun la iaman ĉeeston de prahomoj atestas arkeologiaj trovaĵoj kaj videbla remparo ĉirkaŭ la roko. La loko estas vizitata de nuntempaj turistoj migrantaj tra Bohemia-Moravia Montetaro. El Ŝtoniĝinta Kastelo ni descendis al supermara alto de ĉirkaŭ 700 metroj kaj venis al rokaj formacioj Pernička. Nia scivolemo kaj ŝanco vidi belan panoramon instigis nin ascendi per relative malfacila vojo al la supro de Granda Pernička. En libron ni faris enskribon Esperante kaj ĉine, kaj trovis mesaĝon de Geokaŝado. Sur la supro estas rimarkeblaj „rokaj pladoj“, kiuj en pasinteco povis servi kiel oferejo aŭ signalejo de pratempaj homoj. Poste ni daŭrigis al nia celo, nome roka formacio *Čtyři palice* (Kvar Martelegoj). La bela vetero allogis en la naturon vere multajn turistojn – biciklantojn, turistojn, familiojn kun infanoj kaj ankaŭ esperantistojn! Sur la rokoj ni vidis grandan grupon de rokgrimpantoj.

De la Martelegoj ni intencis reveni al niaj aŭtoj, sed la firmamento kovriĝis de nuboj kaj surprizis nin forta torenta pluvo. La vojo ŝanĝis sin al rivereto, eĉ hajlis kaj fojfoje krakis fulmoj. Multaj turistoj kaŝis sin, nur esperantistoj el Svitavy elprenis pluvombrelojn kaj pluvmantelojn kaj heroe marŝis la restantajn du kilometrojn kaj duonon en la malagrabla vetero direkte al Karlštejn. Kiam la firmamento ŝiriĝis, ni jam tagmanĝis en la kastela restoracio kaj antaŭ ol finiĝis la vizito de la kastelo, la pluvmalseka vesto parte sekiĝis.

Revenvoje ni rigardis fontujon kaj monumenton en la komunumo Svratouch kaj ĉerande de akvoplena herbejo ni klopodis fari fotojn de florantaj orkideoj. Survoje hejmen ni vizitis en Krouná monumenton de viktimoj de fervoja akcidento kaj en vesperaj horoj, lacaj, tamen kontentaj, ni alveturis hejmen.

Karel Čada (9.7.1942).

Kiel vivi kun Esperanto?

Multaj ĉeĥaj esperantistoj konas „Karlon“ el multaj esperantaj renkontiĝoj kiel nelacigan propagandanton de Esperanto, fotografon kaj filmiston, kiu per siaj filmetoj kaj foto-kompletaĵoj dokumentis preskaŭ ĉiujn renkontiĝojn de E-kluboj en Žamberk kaj proksimaj lokoj – Česká Třebová, Svitavy, Litomyšl ktp. Nun, kvankam li jam ne povas partopreni E-aranĝojn kiel antaŭe, li plu interesiĝas pri esperanta vivo kaj eĉ li mem aktive propagandas Esperanton en pensiulhejmo en Ústí nad Orlicí, kie li nun restadas. Por siaj kunloĝantoj li preparis eĉ prelegeton pri Esperanto kaj informis pri aktualaj novaĵoj en Esperanto-medio.

Ladislav Kovář

Esperanto en Hejmo de Pensiuloj en Ústí nad Orlicí

La 27-an de majo 2024 klubanoj de EK Svitavy partoprenis en prelego pri Esperanto en emeritejo de Ústí nad Orlicí, kiun aranĝis Karel Čada. Pasintece Karel organizadis esperantistajn renkontiĝojn en Žamberk, en kiuj ni partoprenis. Siajn travivaĵojn li nun volis dividi kun novaj geamikoj. Li projekciis filmetojn pri pluraj renkontiĝoj en Česká Třebová. Kune ni prezentis al la ĉeestantoj la vivon de esperantistoj. Plej multe ili scivolis, kiel Esperanto sonas.

Unu sinjoro eĉ memoris UK 2016 en Nitra, kvankam li ne estas esperantisto. La personaro, kiu flegas la emeritojn, estas afabla kaj amika.

Libuše Dvořáková

Karel Čada

Rej čarodějnic. 29.4 2024

Hezkých chvilek bylo dosti,
tak se mohlo zapomenout i na
starosti.

Čarodějnice ty hezké byly,
snad každému se zalíbily

I balet se jim podařil
a ten nás však i překvapil.

I vínečko se tam pilo,
náladu to vylepšilo.

K poslechu i hudba hrála,
tedy „třešničku“(prémii) tomu dala.

Že počasí příjemné bylo,
tak to posezení se vydařilo.

Ovofritaĵo en Ostrava-Vítkovice

Jam tradicia renkontiĝo de lokaj esperantistoj kun fritado de ovoj, kantado kaj bona humoro.

Moravia Landa Biblioteko

akceptis la librokolekton de Esperantista klubo Brno. La 19-an de marto 2024 la laboristoj de la biblioteko alveturis en du aŭtomobiloj al la loĝejo de Miroslav Malovec, kie la libroj estis deponitaj ekde 1991. Antaŭe ili estis deponitaj en Klubo Bedřich Václavek, post revolucio oni eksigis ilin kaj provizore ili restis en kelo de magistro Zdeněk Hršel. Sed tie minacis humido, tial M. Malovec proponis akcepti ilin en sia loĝejo. Unue li ordigis ilin laŭ formatoj kaj metis sur bretojn en du vicoj, antaŭa kaj malantaŭa. Tiel li sukcesis enpremi ilin en tri ŝrankojn, sed post certa tempo la spaco ne sufiĉis kaj necesis meti ilin en bananskatolojn, ĉar alvenis postlasaĵoj de pluraj forpasintaj esperantistoj. Ne ĉiuj skatoloj trovis lokon en la kelo.

Leginte pri nove konstruita deponejo de Moravia Landa Biblioteko M. Malovec proponis oferti la kolekton de preskaŭ 5 mil esperantlingvaj libroj al tiu institucio, kiu la oferton ĝoje akceptis.

Laŭ kontrakto aŭtune 2024 estiĝos en MLB Esperanto-fako, al kiu MLB aldonos proprajn 500 esp. librojn kaj proponos ekskursojn tra la institucio al UK Brno 2025. *mm*

Renkontiĝo en Šumperk

La 18-an de majo 2024 renkontiĝis esperantistoj antaŭ la stacidomo en Šumperk kaj forveturis al Velké Losiny. En kastela parko ili rigardis Esperanto-arbon kaj poste vizitis la kastelon mem. En restoracio Stodola ili tagmanĝis kaj prezentis informojn el la kluboj. Poste trampa muzikbando ludis kaj en paŭzoj estis lotumita tombolo.

Vizito de Ruben Fernándes Asensio en Svitavy

En la tagoj 21-23 majo 2024 vizitis hispana esperantisto Ruben Fernándes Asensio Esperantomuzeon en Svitavy. Antaŭe li partoprenis seminarion en Budapeŝto kaj vizitis ankaŭ Esperanto-Muzeon en Vieno, kun kies direktoro ni tenas kontaktojn jam sufiĉe longan tempon. Ili interparolis ankaŭ pri Svitavy. Dum vizito en nia klubo ni ĉiam havis temojn por babilado. Ruben estas profesie mezlerneja instruisto, tial li kun niaj instruistoj Richter kaj Sýkora traktis instruadon, kun Marie Čumová li okupiĝis pri registrado de libroj, gazetoj kaj aliaj presaĵoj, kio al li tre plaĉis, ĉar li transiras al nova profesio kiel arkivisto. Kompreneble ni babilis ankaŭ pri problemoj de Esperanto en Hispanio. Kun Ruben ni renkontiĝos ankaŭ venontjare, dum UK en Brno.

Pri la gepatra, fremdaj kaj planitaj lingvoj

estis ĉeĥlingva prelego de univ. profesoro Filip Křepelka en Klubo de esperantistoj Brno la 5-an de junio 2024. Spektebla en Jutubo.

Ni rememoras

■ Antaŭ 5 jaroj la 5-an de februaro 2019 forpasis **Věra Podhradská**, kiu naskiĝis antaŭ 85 jaroj la 13-an de aŭgusto 1939. Ŝi laboris kiel funkciulino de ĈEA, eĉ kiel prezidantino, kaj multajn jarojn ŝi dediĉis al SET Lančov.

■ Antaŭ 10 jaroj la 1-an de junio 2014 mortis **Zdeněk Hršel,** honora membro de ĈEA. Li iniciatis ellaboron de nova poŝvortaro kaj gvidis la laborojn ĝis 1990. Li ankaŭ prilaboris biografion de verkoj de Miloš Lukáš, kies lernanto li estis en Hradec Králové.

Ni kondolencas

■ La 10-an de novembro 2023 forpasis s-ro **Josef Hořejší** el Rožmitál pod Třemšínem (nask. la 18-an de februaro 1930), laboristo (ilfaristo), kiu instruis en la unuaj postmilitaj E-tendaroj kaj dediĉis sin al Esperanto-skoltismo, kunlaborante kun Pavel Sittauer kaj Stanislav Lešinger.

■ La 28-an de majo 2024 forpasis germana esperantisto **Norbert Karbe** (71j.), kiu ofte vizitadis Lančov kaj aliajn aranĝojn en Ĉeĥio, estis AEH-ano kaj havas nialande multajn amikojn.

Josef Mendl (1932-2024)

forpasis la 16-an de majo 2024 en Milevsko en aĝo de 92 jaroj.

Li naskiĝis 20.1.1932. Laŭprofesie ekonomiisto, li eklernis Esperanton kiel aŭtodidakto en 1948. Ekde 1962 membro de E-klubo en Tábor, ekde fino de 1980-aj jaroj membro de E-klubo en Písek. Aktiva membro de IKEF kaj multjara korespondanto por Ĉeĥio de la magazino *Monato*. Kadre de ELFo li enkomputiligis manuskriptojn de multaj Esperanto-tradukoj (Foglar - *La knaboj de la Kastora rivero , Propra biografio de Karolo la IV-a*, Hašek - *Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk* , verkoj de Čapek (*Naŭ fabeloj*, *El vivo de insektoj*, *Afero Makropulos)*, Škutina - *Malliberulo de la prezidento*, Šmíd - *Ĝojoj de mia vivo* Švandrlík - *Nigraj baronoj* k.a.). Li restos en nia memoro kiel modesta, honesta, fidinda kaj laborema homo.

Rememore pri solenado de la 80-a naskiĝtago (2012) en EK Písek

-padv-

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Andrey Švubové a.svubova@email.cz seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

06940 členství ČES
06941 členství UEA
06942 předplatné Starta bez členství
06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
06944 poplatek UK
06945 kongres EEU
50400 komise pedagogická ILEI
50401 písemný kurs začátečníci
50402 písemný kurs pokročilí
50404 Paroliga kurso
50405 svazové zkoušky
50800 sekce nevidomých LIBE
50900 sekce zdravotníků UMEA
51000 sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 123 - 830 734 0217/0100
51100 sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
51200 sekce informatiky
70100 komise pro tisk a inf.
80200 ediční fond
80300 propagace v tisku
80400 fond Tilio
80500 virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335.** Předplatné uhraďte na účet u **Raiffeisenbank, č. ú. 101 953 9617/5500**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1400,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 850,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1450,- Kč (*970,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (**cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".)*

La Ondo de Esperanto aperas dumaniere: (1) kiel ĉiutage ĝisdatigata novaĵretejo (https://sezonoj.ru/), kaj (2) kiel ĉiusezona almanako (kun literatura suplemento jarfine), kiu enhavas la plej gravajn tekstojn el la novaĵretejo kaj krome artikolojn, eseojn kaj beletraĵojn, verkitajn speciale por la almanako, kiu konservis la nomon "La Ondo de Esperanto". La novaĵretejo ekzistas danke al la donacoj kaj abonoj al la almanako "La Ondo de Esperanto". Malkiel la novaĵretejo, kiu estas libere legebla de ĉiu deziranto, la almanako estas legebla nur de tiuj, kiuj abonas ĝin.

Estas tri abonkategorioj:
1. Abonanto – 400 Kč
2. Amiko – 800 Kč
3. Patrono – 2600 Kč

Ĉi-jara UK okazos somere en Aruŝo, Tanzanio, unuafoje en Afriko.

Periodikum Českého esperantského svazu, z.s.
55. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:

p/a Mgr. Andrea Švubová, DiS, svubova@esperanto.cz

Uzávěrka příštího čísla: 15.8.2024

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio 55-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva numero: 15.8.2024

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

KALENDARO

Aktualaĵojn kaj unuopaj prelegojn sekvu en Eventaservo.org
kaj Kalendaro de Esperanto.cz.

Ĉiun duan merkredon virtualaj kunvenoj de E-Klubo en Brno (Esperantobrno.cz). Gastoj bonvenas!

2024-08-09/11 Renkonto de ekstendaranoj en Lančov, let.lancov@seznam.cz
2024-09-27/29 ĈEA-konferenco en Česká Třebová, komitato@esperanto.cz

Elekto de gravaj aranĝoj eksterlande

2024-07-18/21 41-a Pola Esperanto-Kongreso en Kalisz, kongreso@espranto.pl
2024-08-03/10 109-a Universala Kongreso en Aruŝo (Tanzanio), uk.esperanto.net/2024/
2024-08-03/10 73-a KELI-Kongreso en Vác (Hungario), agnes@raczkevy-eotvos.com

2024-09-20/22 Beneluksa Kongreso en Hasselt, limburg@esperanto.be

2024-08-24/31 90-a Itala Kongreso en Montecatini Terme, fei@esperanto.it

2024-11-07/10 KAEST Žilina kaest.ikso.net, kaest@ikso.net

Na YouTube postupně vzniká internetový kurz esperanta, který vede Tomáš Břicháček. Kurz je určen pro začátečníky a bude mít 20 lekcí.

Marcipana Pasko en Esperantomuzeo

Ruben Fernándes Asensio en Svitavy

Ekskurso al Potštejn

E-mental – Ĝuu Esperanton – Česká Třebová

Kverko de Zanáška
Rememoro pri la fondinto de esperantismo kaj skoltismo en Kopřivnice